Dep. legal: BI-1007-88

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO


NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.°
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

3ª jaro | Aprilo 1989 | Numero 14 (1)

KONGRESEJO

49a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



FACULTAD DE CIENCIAS ECONOMICAS Y EMPRESARIALES
Avda. del Ejército 87. BILBAO



Sro. José Mª. Gorordo Bilbao (Urbestro de Bilbao).
Sro. Gerardo Pradas Calvo (Urbestro de Portugalete).
Sro. Tomás Uribeetxebarria Maiztegui (Deputito pri Kulturo de la Vizkaja Deputacio).
Sro. Mikel Ortiz de Arratia (Respondeculo pri Kulturo de la Bilbao-a Urboregistaro).
Sro. Fco. J. Cruz Expósito (Same, de Portugalete).
S-ino. Socorro Mateos González (Direktorino de la Universitata **Altlernejo por** infanins-truistoj).

****

LOĜEJOJ.- Tiel kiel ni jam informis en la antaŭa numero de "Nia Ponto", ni sukcesis atingi Universitatan Restadejon "Miguel de Unamuno", apud la Kongresejo (Facultad de Ciencias Económicas y Empresariales. Av. del Ejército, 87. SARRIKO-Bilbao).

La prezo estas 2.500 ptoj po|home (tranokto kaj matenmanĝo.

Tiuj kiuj ankoraŭ ne rezervis sian ĉambron, bonvolu skribi, kiel eble plej baldaŭ, al la Organiza Komitato de la Kongreso, ĉar ni devas informi la respondeculojn de la Restadejo pri la nombro de ĉambroj bezonataj.

Aliaj pli malmultekostaj loĝejoj troviĝas en la malnova kvartalo (Casco Viejo), malproksime de la Kongresejo (30/40 min. piede) sed facile atingeblaj trajne aŭ buse.

JUNA KONKURSO PRI ORATORARTO.- Ene de la Kongreso, la Vendredon 21-an, je la 21,30 h., okaze de Junulara Vespero, estas programita konkurso pri orator-arto, kiun povas partopreni ĉiuj geesperantistoj malpli ol 30-jaraj.

Tiuj gejunuloj, kiuj deziras konkursi, bonvolu skribi al la Kongresa sekretario por plej sukcesa organizo de la evento.

★★★★★★★★★

E-EKSPOZICIO.- For de la Kongresejo, en pli centra konstruaĵo, dum la tagoj de la Kongreso, estos muntita E-ekspozicion, kiu, nature, bezonas, por ĝia pleja sukceso, kiel eble plej multnombran enhavon de Esperantaĵoj.

Ĉiuj donaĵoj, luaĵoj, sugestoj, ideoj, ... estas bonvenaj.

STATISTIKO

Aliĝo ĝis la 20-a de Aprilo (entute 118 kongresanoj)

VALENCIO	28	KANARIAJ INS.	3
VASKIO	28	KANTABRIO	3
KATALUNIO	19	KASTILIO-LEONO	3
MADRIDO	9	LA RIOĤO	2
ASTURIO	7	ANDALUZIO	1
GALEGIO	5	ARAGONO	1

EKSTERLANDANOJ 9

Viroj	67
Virinoj	49
E-Grupoj	3

Averaĝa aĝo ..... 57 jaroj
" kotizo ... 1.659 ptoj

NOTOJ

① - Kongresejo "Facultad de CC. Económicas" (SARRIKO)

② - Restadejo "Miguel de Unamuno".

③ - Stacidomo "Abando".

④ - Grupo Esperantista kaj diversaj pensionoj.

⑤ - Urbodomo.

Ⓕ - Trajnaj haltejoj. ("Ibarrekolanda" apudkongreseja haltejo).

49-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



49-a KONGRESO DE HEF

FIKSADO DE LA LABORPLANO DE HEF POR LA JAROJ 1989/93

Certe la kongreso de Bilbao ne estos simpla formalaĵo, tiel kiel estis la plejparto de la ĝisnunaj kongresoj de HEF. Kaj ne vidu en tiuj vortoj ian riproĉon, eĉ malgrandan, ĉar ĉiu el ili ludis sian ĉefrolon, nome, kunigi dum kelkaj tagoj la hispanan Esperantistaron, kio tute ne estas nanaĵo, vidante la individuemon de ĝiaj membroj; kaj ni ankaŭ ne forgesu kiom da laboro, sindonemo, tempo, mono, eĉ miskomprenoj kaŝiĝas post ĉiu el tiuj 48 L.K.K., kiuj organizis la antaŭajn kongresojn.

Sed la ĉi-jara kongreso povas signali la komencon de nova epoko en la historio de la E-movado en Hispanio. Espereble, la renovigo de la estraro de HEF estos iom pli ol nura ŝanĝo de Homoj.

Post dufoja kunsido en Madrido de dudeko da Esperantistoj alvenintaj el la diversaj anguloj de Hispanio, estos preta, por la kongreso, projekto kiu sistemigas kaj eksplicitas diversajn agadojn realigendajn fare de HEF, ekde nun ĝis la jaro 1993, kiam estas antaŭvidita Universala Kongreso en Valencio.

Kun la celo diskuti kaj trastudi tiun planon, je dispono de ĉiuj interesuloj estos tri malsamaj ejoj, en unu el kiuj okazos <u>konstanta</u> estrarkunveno. La diskutado tuŝos i.a. jenajn punktojn:

- Ĝeneralaj trajtoj de la laboroj por la periodo 1989-1993.
- Taskoj farendaj en Hispanio.
- Taskoj farendaj por internacia kunlaboro.
- Muntado de la reto da kunlaborantoj, kiun oni organizu laŭ du kriterioj:

  (a) Fakeco de ĉiu homo.
  (b) Reprezento de ĉiu provinco aŭ aŭtonoma komunumo.

NIA PONTO Redaktis: Jesús M. García kaj Iñaki Vélez

G R U P A J N O V A Ĵ O J

ĜENERALA ASEMBLEO DE LA G.E.B.- Laŭ postulas niaj Asociaj Statutoj, la pasintan Ĵaŭdon 16-an de Marto, je 2-a kunvokigo, okazis la ĉiujara ĝenerala kunsido de nia sociaro.

Ĝin partoprenis 14 anoj, kaj krom la kutimaj aferoj aprobendaj (antaŭa Akto, Memuaro, bilanco pri en - kaj el-spezoj kaj buĝetpropono) oni decidis, unuanime, ke nia nuna estraro daŭrigu unu plian jaron pro la proksimeco de la 49-a Hispana Kongreso.

VIDBENDO "VIVI EN EŬSKADI".- Ĝis nun ni transdonis al la Vaska Registaro 28 mendojn ricevitajn el diversaj landoj kaj Kontinentoj; inter ili, ni menciu:

Niĝerio, Japanio, Usono, Sovetio, Bulgario, Pollando, Eŭropa Komunumo, k.t.p., krom multaj el Hispanio, precipe el Katalunio.

Ni ankoraŭ atendas pliajn ....

ĈU VASKA ESPERANTO-ASOCIO...?

Laŭ propono de niaj amikoj el Alava Esperanto-Asocio jen aperas la ideon starigi ĝin. Fakte refondo de iama ekzistanta VASKA ESPERANTO-FEDERACIO (kredeble inter 1910-1926).


Por la nuna etapo VEA (laŭ ankoraŭ provizoraj statutoj) celus:

- Grupigi vaskajn esperantistojn.
- Diskonigi la internacian lingvon E-o en ĉiuj medioj.
- Konigi internaciskale la realon de la vaska kulturo.
- Organizi renkontiĝojn, seminariojn ..., kiuj estu taŭgaj por la lingva profundigo kaj disvastigado de la lingvo.
- Stimuli la agadon de la lokaj esperantistaj grupoj...

Ĉar la afero ankoraŭ estas prilaborebla projekto, ĉiu sugesto aŭ ideo estas bonvena. Demandu ĉe la Sekretariejo.

49-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

19ª 23ª JULIO 1989



1989

BILBAO

Grupo Esperantista de Bilbao
1906 – 1989